



EKO 2016-08 sendita el Ĵakarta, Indonezio, la 19an de marto.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

AMO en Ekstremaduro lige al la 75-a Hispana Kongreso

Hispanio gastigos tritagan AMO-seminaron (29-a de junio-1a de julio 2016); la elektita temo, aparte grava por nia Movado, estos rilata al informado: "Aktualaj eblecoj por disvastigi Esperanton". La seminaria programo disvolviĝos parte paralele al la 75-a Hispana Esperanto-Kongreso (kies ĉijara temo, aparte fokusita je la kongresa regiono, estos: "Ekstremaduro: lando de limoj kaj kontaktoj"), okazonta en Herrera del Duque de la 30-a de junio ĝis la 4-a de julio 2016.



José Antonio del Barrio, Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, kaj José María Salguero, Sekretario de la Loka Kongresa Komitato, kunordigos la seminarion; la gvidontoj de la diversaj sesioj estos anoncigitaj dum la venontaj monatoj.

Sara Spanò, Komisiito de UEA pri Aktivula Maturigo, enkondukos la AMO-programon kaj helpos maksimumigi la rezultojn de la seminario, kunlabore kun la lokaj kunordigantoj, la gvidontoj kaj la partoprenontoj en la diversaj sesioj.

Raportis: S Spanò

AMO 21 en finpreparo

Tiu seminario okazos tra ĉ. 8 horoj en tri duontagoj (la 24an, 25an kaj 27an de marto) en Bandung, Indonezio kajdre de la Trilanda Kongreso, kiu kunigas Aŭstralianojn, Novzelandanojn kaj Indonezianojn, kiel ilustras la kongresa emblemo..

Kvin gvidontoj ricevos po ĉ. horon: Lee Jungkee (KR), Sandor Horvath (AU), D-ro Markus Gabor (HU kaj Azio), Stefan MacGill (HU kaj Novzelandano), Ilia Dewi (ID); la tuto finiĝos kiel en Nepalo per forumo kaj formulo de rekomendoj. Raporto en sekva EKO.



Saluto de UEA al la 9a Mezorianta Kunveno (MK)

Mi ĝojas havi la okazon saluti nome de la Universala Esperanto-Asocio al la 9a MK, kiel la estrarano kun respondecas por la regiono MONA – Mezoriento kaj Norda Afriko.

Mi ĝuis la eblon partopreni la 8an MK en Hammamet, Tunizio antaŭ unu jaro, kaj nun deziras plenan sukceson al la nuna kunveno. Farata des pli ĝoje, ĉar okazos kadre de la kunveno la 23a Seminario pri Aktivula Maturigo. Mi fidus, ke la enhavo estos riĉa kaj partopreniga. Tiu seminario helpas al ni starigi du novajn AMO-rekordojn. Ene de kvin semajnoj, okazis tri seminarioj en Azio, ĉiuj en landoj, kiuj ĝis nun ne gastigis seminarion. Ene de 14 tagoj okazos tri seminarioj, 21, 22, 23 en respektive Indonezio, Italio kaj Turkio. Du el tiuj okazos praktike samtempe. Neniam antaŭe la AMO-programo atingis tian intensecon.

Okazigo de Mezoriantaj Kunvenoj estas la ĉefaj agadoj de la aktivado de MONA, sed indas aktive pripensi aliajn terenojn por aktiveco. UEA jam flankemetis rimedojn por la pretigo de almenaŭ unu bazan informilon en la araba (oficiala lingvo de UN), do bv. krei planojn por realigi tion ene de 2016! Pliaj proponoj por agado bonvenas!

[...] . Do, plenan sukceson al la aranĝoj en Ürgüp!

SMG

Limdatoj por la KER-ekzamenoj

Por la sesio en Greziljono, okazonta la 16an de aprilo, eblas aliĝi ĝis la 31a de marto. Por la 5a Tutmonda Ekzamentago anoncis sin jam 10 urboj. Peti eblon por okazigi sesion eblas ĝis la 1a de aprilo. Okazos dum UK en Nitro ekskurso al Budapeŝto, al la ekzamencentro.

Francoj bonigu tradukkapablojn en Kvinpetalo

De la 11a- ĝis la 16a de aprilo okazos staĝo pri tradukado en Bouresse, en Kvinpetalo, gvidata de Brian Moon, vicprezidanto de la Akademio. Kie renkontiĝas diversaj lingvoj, ĉiam necesas tradukoj, sed bona regado de lingvoj kaj bona kapablo traduki ne ĉiam kuniras. Tradukadon necesas aparte ekzerci, kaj dum tiu ĉi semajno ni faros ĝuste tion, esperantigante francajn tekstojn plej diversajn.

La celo estas tradukado altnivela, sed ankaŭ plibonigo de la lingva nivelo en Esperanto, ĉar analizi tradukproblemojn povas konduki ankaŭ al lingvolecionoj. Partoprenantoj de diversaj lingvoniveloj estos do bonvenaj. La kurso taŭgos ankaŭ por prepariĝi al la traduka parto de la Atesto pri Supera Lernado de FEI.

Niaj temoj prezentitaj en lingvistika revuo

Ĝus aperis la jubilea volumo de la universitata lingvistika revuo JKI 10 (Lingvo. Komunikado. Informado) kiu estas dediĉita al interlingvistiko kaj esperantologio, entenas plurajn studojn de prelegantoj kaj studentoj de la Interlingvistikaj Studoj (en UAM), parte prezentitaj dum la 3a Interlingvistika Simpozio en 2014. La materialo (parte esperante, parte angle) baldaŭ leĝeblos en la retejo de la revuo (<http://jki.amu.edu.pl>) same kiel la antaŭaj numeroj. La revuo (kiu aperigas polajn kaj anglajn artikolojn) ekde 2011 regule enhavas artikolojn ankaŭ pri interlingvistiko.

Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj
<http://www.amu.edu.pl/~inter/>

La planita raporteto pri la vizito en Singapuro prokrastiĝos pro maleblo nun aliri la foton – au – kiel ni emas diri en Hungario ‘...pro teknikaj kialoj’.

Vortoj: 790

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikojn iru al: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA_FA...